

1300 flandroj sekvis kursojn de diverslandaj instruistoj.

La raportoj pri la laboro de la Esperanto-ligoj en la diversaj landoj aŭ regionoj estas tre ĝojigaj, ĉar la progreso en unu parto de la mondo refortigas kaj instigas nian batalemon por la internacia lingvo. De tempo al tempo aperis tiaj raportoj en "Heroldo de Esperanto", i.a. pri Danujo kaj Aŭstrio. Ili devus pli multe aperi, kaj, landaj propagandaj centroj devus zorgi pri tio, ĉar oni ja ne havas la landajn esperantistajn revuojn por rigardi la novaĵojn; sed artikolo, kompilita de iu centro kaj presita en Heroldo, povas servi por la propagando alilande.

La suba artikolo rakontas al vi pri la laboro kaj progreso de la Flandra Ligo Esperantista, la ligo kiu propagandas inter la nederlandlingvaj loĝantoj de Belgujo.

En Flandrujo la esperantista movado ne estis forta kaj restis en sama stato. Je la fino de 1936 ekzistis nur 10 sekcioj de la Ligo kun 246 membroj. La nuna stato estas 500 membroj en 25 sekcioj. Tiun progreson dankas la Ligo al la Cseh-metoda instruo de kelkaj eksterlandaj profesoroj. Dum la vintro 1935-1936 la Flandra Ligo jam faris provon por ekscii, ĉu vere ekzistas en Flandrujo intereso pro la Cseh-metodo. La gvidantoj plikuraĝigis kaj dum la vintro 1936-1937 oni faris grandskalan propagandon. La centro estis ĉe s-ro Rainson, Hombeekschesteenweg 54 en Mechelen, kiu gvidis tiun fakon. Li invitis diversajn instruistojn Cseh-metodajn, kaj la laboro komenciĝis.

La unua, kiu komencis la instruon, estis la juna nederlanda ĉefinstruisto Henk Thien, rekomendita Cseh-profesoro, kiu jam gvidis grandsukcese en Nederlando kaj Francujo, la sama kiu instruos la somerajn kursojn, oficialigitajn de la Franca Esp.-Asocio, en Malo-les-Bains.

La unua serio estis: Kortrijk 53 lernantoj, Waregem 24, Deinze 33. La organizintoj estas: s-ro Debrouwere, la sekretario de la Ligo, kaj s-ro Vanderlinden. - La dua serio estis: Sint Niklaas 14, Hamme 11 kaj Dendermonde 17 lernantoj. Organizintoj estis s-roj Geerink, Lenaers kaj kelkaj lokaj reprezentantoj de la Flandra Turista Asocio, kaj s-ro Thien mem. - La tria serio estis: Gent 26, Aalst 12, Opwijk 10 kaj Wetteren 89. La organizintoj estas f-ino De Cock, s-ro van Laere, f-ino Terryn kaj s-ro Rainson. - Perfektigaj kursoj okazas en: Opwijk 5, Gent 10 kaj Wetteren 15 lernantoj. Pro tiuj kursoj estiĝis novaj sekcioj en Gent, Deinze, Lebbeke kaj Opwijk, kaj oni starigos po unu en Wetteren kaj en Hamme.

La dua Cseh-instruisto, kiu instruis en Flandrujo, estas s-ro Heidler, ĉefo, kiu grandsukcese kursis en la Nordoriento.

La unua serio estis en Arendonk 58, Geel 55, Mol 58, Herentals 40 kaj Turnhout 60 partoprenantoj. Organizinto estas s-ro Rainson, kiu faris multegan laboron por propagandi en la diversaj lokoj. La dua serio okazis denove en la antaŭaj lokoj, kaj la nombroj estas: Geel 40, Mol 28 kaj Turnhout 23 lernantoj. Sekcio estas starigita en Arendonk.

La tria Cseh-instruisto, estas la ĉefo Solc, kiu ankaŭ havis multan sukceson. Lia unua serio de kursoj okazis en Aarschot 23, Leuven 22, Zaventem 8, Tienen 22 ~~partoprenantoj~~ partoprenantoj. - La dua serio en Oostende 31, Blankenberge 27, Brugge 20 kaj Nieuwpoort 12 lernantoj. - La tria okazis en: Kortrijk 28, Anzegem 25, Vichte 31 kaj Oudenaarde 30 personoj. - La organizinto de ĉiuj kursoj estas s-ro Rainson, prezidanto de la Flandra Esperanto-Ligo. Novaj sekcioj estiĝis en Aarschot, Blankenberge, Oudenaarde, Tienen, Vichte, Zaventem.

La kvara Cseh-instruisto estas la nederlandano s-ro Stuit konata pro siaj sukcesplenaj kursoj en Svedujo kaj Francujo. Li kursis en Diksmuide 34, Handzame 21 kaj Kortemark 11. - La dua serio de kursoj okazis en: Torhout 52, Staden 9 kaj Woumen 51 lernantoj.

-Organizintoj estas s-ro Rainson kaj s-ro Stuit mem. La lasta verkis libreton pri sia restado inter la flandroj. - Novaj sekcioj estas nun en: Diksmuide, Torhout, Woumen.

Restas ankoraŭ s-ro de Graan, nederlandano, kiu instruis en Wervik 15, Wevelgem 17 kaj Zwevegem 28; s-ino Sindhwad, la edzino de hindo, kiu instruis en: Vilvoorde 8 kaj en Assche 12. - Nova sekcio estas en Vilvoorde.

La prezidanto de la ligo instruis en Mechelen 8 kaj en Wilrijk 7 personojn.

Ankaŭ kelkaj librometodaj kursoj okazis, nome en: Aalst 10, Antwerpen 15, Bruselo 10 kaj 8, Diksmuide 3, Roeselare 10 kaj Vichte 16 lernantoj.

Ni vidas do ke preskaŭ 1300 flandroj sekvis la kursojn, aranĝitajn de la Flandra Esperanto-Ligo.

Por la venonta vintro oni jam preparas novan planon por pli sisteme propagandi en la diversaj regionoj.

La Flandra Esperanto-Instituto en Kortrijk, kiu estas aparte starante entrepreno, ankaŭ pli multe vendis ĉi tiun lastan vintron, ĉar ĝi servas por plifaciligi la aĉeton de libroj kaj aliaj esperantaĵoj.

La gazetaro akceptis multajn artikolojn por la okazantaj kursoj, sed apartan mención meritas la ĵurnalo "De Dag", kiu enhavas ĉiudimanĉe Esperanto-rubrikon, prizorgatan de s-ro Mortelmans. La revuo de la Flandra Turista Asocio enhavos dum la venonta vintro Esperanto-kurson. Tio estas treege efika, ĉar tiu asocio havas milojn da membroj.

La kongreso okazis dum Pentekosto en Leuven. 250 personoj en 6 diversaj nacioj partoprenis. Tio estis bona fermo de la lasta laborjaro.